# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 3 Marto, 2018

*Karaj Legantoj, kiel vi? Ni esperas, ke bone: surstrate printempo, paŝo post paŝo eniras en siajn posedaĵojn, portante varmon, freŝecon, junecon. Jes, la ŝlosila vorto de la lasta frazo kaj de nia pasinta societa kunsido estas "juneco", "nia diligenta kolegaro" en Ŝikago plijuniĝas, duono de partoprenintoj estas 30-dekjaraj aŭ eĉ mapli ol. Mia mezaĝa koro kaj animo estas ĉirkaŭlavitaj per verdaĵo – simbolo de juneco kaj printempo. Do, hodiaŭa numero de nia bulteno estas dediĉata al la lasta kunveno, kerno de kiu estis raporto de nia vicprezidanto pri la TAKE'2018. Li ne nur priskribis la kongreson, sed ankaŭ transdonis stafeton al s-no Hanso, kiu partoprenis la saman aranĝon kaj serioze prelegis. Ili ambaŭ plialtigis prestiĝon de nia E-societo. Dankon!*



*Vi ankaŭ trovos interesan kaj utilan informon de niaj eŭropaj kolegoj kaj de ESF. Do, ek la legado!*

*La redakcio*

## TAKE (1) de *Randio Ream, vicprezidanto de la ESdŜ*

La 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto estas la "ĉefa kongreso celanta arigi ne nur la esperantistaron de ambaŭ Amerikoj, sed ankaŭ esperantistojn el la tuta mondo…" diris la prezidantino de la Kuba Esperanto-Asocia Maritza Gutierrez Gonzalez. Por la 9a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto aliĝis pli ol 100 samideanoj el pli ol tridek landoj kune kun eble 200 kubaj Esperantistoj! Post la alveno al nia kuba domo, ni promenis al la Centra Oficejo de la Kuba Esperanto-Asocio kaj trovis tiun ĉi statuon de Ludoviko (*vd foton*). En la matenoj ni trinkis kafon kun niaj novaj amikoj. En Kubo oni trinkas fortan kafon! La kongresa temo estis "Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj". Kaj ni ĉeestis multajn interesajn prelegojn kaj prezentaĵojn. Inter ili estis prelego de nia estimata samsocietano Hanso pri la E-societo de Ŝikago! La titolo de la prelego estis "Kiel bona varbado duobligis nian klubanaron en Ĉikago, Usono". En prelegal anonco oni skribis: "Ĉikago, la tria plej granda urbo en Usono, ekde la fruaj jaroj de la IL en Ameriko estis nodo de agado por Esperanto. La kutima agado en la metropolo, konsistanta el preskaŭ 10 milionoj da loĝantoj, estis iom rfika: nia societo renkontiĝis po unu fojo monate en la urbocentro, varbis per flugfolioj, afiŝoj kaj neregulaj kursoj por daŭrigi sian agadon. Sed ekde la apero de novaj interretaj kursoj por anglalingvanoj, nia societo devis decidi, ĉu ĝi konservos sian kulturon aŭ ŝanĝiĝos por allogi la novan generacion de novjunuloj, kiuj lernas interrete. Ni decides sekvi la mezan vojon…" (*pri tio vi legos en la sekvanta n-ro de Saluton!*)



Dum la vesperaj aranĝoj ni ĝuis mutajn muzikistojn (*vd la foton*), manĝaĵojn kaj teatraĵojn! Nia vojaĝo al Kubo estis nekredebla!



## NASK-2018: elstaraj instruistoj, kvar kursoj kaj KTF!

NASK-2018 estos tre speciala ĉi-jare: estos kvar niveloj de instruado (inkluzive de la komencanta kurso, la unuan fojon en multaj jaroj), famaj instruistoj (Katalin Kováts, Anna Löwenstein, José Antonio Vergara kaj Thomas Alexander) kaj la speciala gastparolanto: la antaŭa prezidanto de UEA, Renato Corsetti, plus, samtempe kun NASK denove okazos KTF: Kino-Teatro-Festo. Jen nur kelkaj kialoj veni al NASK-2018 (3-12a de julio 2018, Raleigh, NC, Usono)!

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) estas intensa, merga kursaro en Esperanto, kiu okazas seninterrompe ekde 1969. Same kiel dum kelkaj pasintaj jaroj, NASK okazos en la universitato William Peace (Raleigh, Usono). - *ESF*

## Nova enciklopedio: Nia diligenta kolegaro




Post du semajnoj en Kaŭno (Litovio) estos presita nova 320-paĝa enciklopedio pri 200 eminentaj esperantistoj, kiun kuneldonas la Ruslanda eldonejo *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio: **Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander.** ***Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj.*** Nia diligenta kolegaro meze de februaro estos aĉetebla en la libroservo de UEA kaj en aliaj grandaj Esperantaj libroservoj kontraŭ 30 eŭroj (plus sendokosto). Ĝis la 28a de januaro 2018 ni akceptas individuajn antaŭmendojn kontraŭ 25 eŭroj (sendokosto inkluzivita).

## ESF informas:

– February 12, 2018 – Esperanto-USA has received a $20,000 grant from the Esperantic Studies Foundation (ESF) for support of leadership training and education. The funds will be used for training and education initiatives at the local, regional and national levels in the US and for the development of young Esperantists to prepare them for leadership roles. The goal of the grant is to capitalize on the recent interest by the more than one million people who have used the free language learning site Duolingo to learn Esperanto and in many cases are eager to put the language to use in new and practical ways.

– Signifa donaco de ESF helpis certigi la estontecon de studoj pri Esperanto kaj interlingvistiko ĉe unu el ĉefaj nederlandaj universitatoj. La tuta sumo de 27.000 USD, donacita al la Fonduso Middelkoop de UEA, estos uzata por certigi la estontecon de la katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo.

– Du lastatempaj donacoj de ESF helpas konservi la historion de Esperanto-societoj en Nord-Ameriko kaj helpas konstrui bibliotekajn kolektojn pri Esperanto kaj rilataj kampoj. La biblioteko Firestone ĉe la universitato Princeton, kie kelkaj profesoroj aktivas pri instruado kaj esplorado de Esperanto, strebas akiri novajn materialojn, precipe presitajn librojn, kiujn oni disponigos al esploristoj pri tiu kampo. Ni esperas ke tra la jaroj, Firestone, surbaze de siaj jam konsiderindaj kolektoj, fariĝos unu el la ĉefaj nord-amerikaj bibliotekoj en la kampo de planlingvoj.

– La Studogrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, fondita parte laŭ iniciato de UEA, organizas, kun financa helpo de ESF, "Multlingvismo en internaciaj organizaĵoj kaj internacia kunlaboro," ĵaŭdon kaj vendredon, la 10-an kaj 11-an de majo, ĉe 777 UN Plaza, Novjorko, komence je la 9-a horo la 10-an de majo.

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – Eric Killian
Vicprezidanto – Randy Ream
Ekspredizanto – D-ro Les Kordylewski
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Charles Gunn
Direktoroj – Viktor Payuk, Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare
Familia membro: $30
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos en la Centra Biblioteko laŭ la adreso: **400 S. State St., Ŝikago, IL 60610**. 6-a (sesa) etaĝo suda (aŭ norda) stud-ĉambro.

**27-an de Marto** – La Mirinda Sorĉisto de Oz
**24-an de Aprilo** – Pri Lisbono
**22-an de Majo**– Porinfana literaturo
**24-an de Junio** – tradicia E-pikniko

## En la franca E-kastelo de Gresillon

De la 20-a ĝis la 28-a de Aprilo 2018 okazos la 8-a staĝo **PRINTEMPaS** kun proksimume 40 partoprenantoj. En la programo: kursoj A1-A2, B1-B2; Internaciaj KER-ekzamenoj gvidataj de E-instruistoj de Francio, Germanio, Litovio; prelegoj; bona etoso kaj bonaj manĝoj (viando aŭ vegetare): gresillon.org/printe mpas. Bv kontakti: kastelo@gresillon.org